FENIKSO NIGRA

# ANARKIO

INFORMA MONATA BULTENO
MAJO 2011
Nº 09





## Bataltago de la laborista klaso

La tumulto de Haymarket aŭ tumulto de Haymarket Square okazis en majo 1886. La 1-an de majo 1886 ekis en Ĉikago (Illinois, Usono) plurtaga, de la sindikatoj organizata striko por postuli malplilongigon de la taga labortempo de dek du al ok horoj.

La eventoj rilataj al tiu striko kaj la sekvaj tagoj fondis la tradicion de la internacia laborista movado kaj de sindikatoj, deklari la 1-an de majo "bataltago de la laborista klaso".

Eventoj

Kiam la 3-an de majo polico intervenis por disigi kunvenon de strikantoj ĉe la entrepreno de rikoltmaŝinoj McCormick, ses laboristoj estis mortigitaj kaj aliaj vunditaj. Dum la sekva nokto kunvenis pluraj miloj da strikantoj kaj marŝis al Haymarket-Square. Denove la polico provis, eĉ sub influo de la antaŭaj perfortaj eventoj, disigi la kunvenintojn. Sed la protestomarŝo daŭris kaj evoluis pace. Ankaŭ la urbestro, Carter Harrison Sr., post kontrolo de al situacio, hejmeniris frue.

La venontan tagon, la 4-an de majo, iu ĵetis bombon en la homamason, kiu denove kunvenis ĉe Haymarket Square. Dek du homoj mortis, la policano Mathias J. Degan mortis surloke kaj seb aliaj policanoj poste pro la gravaj vundiĝoj. Tiam la policanoj ekpavis kaj mortigis kaj vundigis nekonatan nombron de protestantoj. Ĉar kelkaj el la parolintoj de tiu tago estis anarkistoj, oni deduktis, ke anarkisto ĵetis la bombon. Pruvo pri tia ligo estis neniam alportita.

Kvankam neniam eĉ rekonis la bombĵetiston, ok viroj, kiuj kunorganizis la strikon, estis akuzitaj kaj kulpigitaj. Ne ekzistis pruvo pri rilato inter la akuzitoj kaj la bombo. Tamen argumentis la juĝisto, ke la bomboĵetinto agis pro ideoj de tiuj viroj, kaj ke tial ili kulpis same kiel ili mem ĵetintis la bombon. Albert Parsons, August Spies, George Engel kaj Adolph Fischer estis pendumitaj. Louis Lingg sinmortigis mallibereje senkapigante sin per kaŝe enportita dinamito (iu fonto notas revolveran kartoĉon metitatan interdenten kaj eksplodigitan per kandelo). Oscar Neebe estis kondamnita je 15-jara mallibereja puno. La mortkondamnoj de Michael Schwab kaj Samuel Fielden estis transformita de la guberniestro Richard James Oglesby al vivlonga aresto.

Tiaj kondamnoj estiĝis protestegojn en ĉiuj internaciaj labormovadoj ĉirkaŭ la mondo.


Oni daŭre citas la vortojn de August Spies:

"Iam venos la epoko, kiam nia muto estos pli forta ol la voĉoj, kiujn vi mutigas hodiaŭ."

La 26-an de junio 1893 la guberniestro de Illinois John Peter Altgeld liberigis Samuel Fielden, Oscar Neebe kaj Michael Schwab. Tia agado samtempe signis la finon de la politika kariero de John Peter Altgeld.

anarkio kaj esperanto

## Unua Majo



La tago de la Laboro estas festata en multaj landoj je la 1-a de majo. Ĝi estas tradicia batal-tago de la laborista movado.

La elekto de la dato reiras al ĝenerala striko, kiun la nord-amerika laborista movado proklamis por la 1-a de majo 1886, por ĝeneraligi la ok-horan labortagon. La sekvaj konfliktoj kun la polico iĝis perfortaj; la 3-an de majo la polico mortpafis kvar laboristojn. Je la 4-a de majo okazis protesta manifestacio, kaj iu ĵetis bombon, kiu mortigis plurajn policanojn (Haymarket Riot = ribelo de fojnbazaro). Ĉar la atencinton oni ne trovis, oni arestis ok organizantojn de la manifestacio kaj ekzekutis kvar; unu laŭdire mortigis sin mem. La ceteraj tri estis liberigitaj post ses jaroj.



## KIUJ NI ESTAS?

Ni estas homoj, kiuj venis libervole kaj volonte. Post la manifestacio okazinta pasintdimanĉe, la 15an de Majo, ni alprenis la decidon resti kunaj por plue depostuli dignon kaj politikan-socian konscion.

Ni reprezentas neniun partion aŭ asocion.

Kunligas nin granda emo al ŝanĝo.

Ni kunas ĉi tie pro digno kaj pro solidareco kun la homoj, kiuj ne povas kuniĝi kun ni.

## KIAL NI KUNAS ĈI TIE?

Ni kunas ĉi tie, ĉar ni aspiras al nova socio tia, ke ĝi metu la vivon super la ekonomiajn kaj politikajn interesojn. Ni pledas por ŝanĝo de la socio kaj de la socia konscio.

Ni kunas ĉi tie por pruvi, ke la socio ne falis en dormon kaj ke ni plue pace batalados por la celo, kiun ni meritas.

Ni apogas la kamaradojn arestitajn post la manifestacio kaj petas, ke oni liberigu ilin senaj je akuzoj.

Ni volas ĉion kaj volas ĝin nun. Se vi konsentas kun ni, kuniĝu!

"Preferindas riski kaj perdi, ol perdi pro la fakto, ke oni ne riskis".

## Lasta horo

Neatendita estis popola ofensivo em la sektoroj de Madrido. La malamiko perdis gravajn poziciojn el kiuj ĝi, per furiozaj kontraŭatakoj, intencas repreni kelkajn. En ĉiuj ceteraj frontoj la situacio ne montras reliefajn ŝanĝojn. En la aero, la respublikanaj flugiloj plene mastras; la faŝistoj perdis, dum unu semajno, pli ol kvindek aviadilojn; en tiu sama spaco ni perdis nur sep. En la internacia fronto, nia prestiĝo kreskas daŭre en la popolaj tavoloj, dum la sabotado tre persiste agas en la angla Ministerio por eksterlandaj aferoj ...

En la esperanto-gazeto Popola Fronto 1 aŭgusto 1937




La apaĉo prezentas «senkulpigojn» al la juĝistoj.

## Ni bezonas voluntulojn!

Nia iniciatemo bezonas voluntulojn por skribi, traduki, desegni aŭ por iu ajn kontribuaĵo.
Ĉia helpo estas bonvenan, dankon!
Sanon kaj anarkion!

Kontaktojn
Fenikso Nigra
CP: 999 - CEP 13001-970 Campinaso - San-Paŭlio
Aŭ
Sindikato el Artaj kaj Diversaj Oficoj Laboristoj de Campinaso (SADOL-Campinaso) BLK-ILA
m.e.: fenikso@anarkio.net m.e.: campinas@fosp.cob-ait.net
http://anarkio.net http://cob-ait.net/fosp